# *Díaz-Canel: kubaj laboristoj ?efrolu en la ekonomia plano*



Havano, jan 9 (RHK) La kuba prezidento Miguel Díaz-Canel partoprenis kun la sindikatestroj de la tuta lando, kaj aliaj funkciuloj de tiu organiza?o, en la pritrakto de la farenda?oj por ke la laboristoj estu ?efrolantoj en la debatoj pri la ekonomia Plano  2020.

La prezidento alvokis ?iujn transformi tiun ?i debatprocezon en momenton por starigi kompromisojn kaj sindevigojn de la laboristaro, tiel ke ili estas kontribuantoj per agadoj kaj ideoj cele al plenumo de la ekonomia plano.

Tiu ?i procezo devas esti konstanta por eltrovi solvojn al kernaj demandoj, pri tio, kion ni produktos kaj kiel, kiel ?pari kaj  eksporti pli.

La prezidento emfazis ke estas kvar prioritatoj por nia lando, unue, la ideologia batalo, la defendo de la lando, la intensa le?ofara ekzerco komencita kaj da?ra por subteni la konstitucion, kaj la ekonomia batalo.

Siaflanke, la ministroj de ekonomio kaj financoj pritraktis esencajn aspektojn de tiuj debatoj, kiel ?paro, rendimento de la investoj kaj salajroj, la graveco maksimumigi la enspezojn kaj racieco en la elspezoj.

Oni prezentis kalendaron de agadoj por protekti kaj garantii la plenumon de la ekonomia plano. Tamen, ne nur dependas de la estraroj, sed de ?ies kontribuo. Por tiu celo, dum januaro kaj

februaro la laboristoj havos la okazon diskuti kaj fine interkonsenti por transformi la efikecon, ?paron, rimedkontrolon kaj rezervekspluatadon en ?iutagajn praktikojn.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/211503-diaz-canel-kubaj-laboristoj-cefrolu-en-la-ekonomia-plano

**Radio Habana Cuba**